# KALEJDOSKOPO

KALEJDOSKOPO

---

K 27 Septembro 1978 Kvaronjara eldono

---

## Kiel alkroĉis la musoj la sonorilon sur la kolon de la kato?




Legu paĝojn 2 kaj 3.

Maljuna muso: Ni aŭdas la sonorilon, ni havas tempon nin kaŝi.
Nun ni jam ne timas, ke vi kaptos nin, kato !
Vere: "Pli per saĝo, ol per forto !".

L.Kökény

Represita el "Hungara Vivo" 1962/3 kun afabla permeso de la redaktoro.







Ludmila Jevsejeva


## S K A R A B O

Bruna,
Kvazaŭ arabo,
Zumas
la majskarabo;
Zumas kiel
motoro,
zumas
en suna oro.

Karesvoĉe, en orelon,
flustras mi al pupo:
"Vi ne timu la skarabon,
ĝi ne estas lupo!"

---

Melontolo
aŭ
Majskarabo.



## KIA TREZORO !

La ŝtelema birdo konstruis belan rondforman neston el musko, herberoj, ĉevalharoj, laneroj kaj lanugo !

Ĝi staras sur la rando de sia nesto kaj vartas* sian trezoron.

Ĝi parkere konas ĝin:

unu plumo kaj unu najleto, ambaŭ el brila metalo,
unu paperfiksilo el brila metalo,
unu plata ŝlosilo el flava kupro,
alia ŝlosilo el fero malmola
kaj unu granda fermita pinglo kun stango bukla !

Nur el metalaĵoj novaj kaj brilantaj konsistas ĝia Trezoro (entute SES objektoj!).

La birdo treege fieras pri ĝi ! Vidu ĝin sur paĝo ses.

* Oni kutime vartas nur infanon aŭ malsanulon - sed la birdo tiel amas sian trezoron, kiel patrino sian infanon.

Odile Badet.

---

NI VERKAS

Kun ĉi tiu eldono de "Kalejdoskopo" vi denove ricevas ekzempleron de la gazeteto verkita de infanoj. Andre Gimbert atendas --vidu paĝon 16.


H h


*H h*



Morsa kodo:

H = ....









<u>Eraro</u>

En Kalejdoskopo K25 la morsa kodo de la litero D devis esti kun du punktoj D= ..

fantaziaj dentetoj
rondforma kapo tute plata
kaj meze de la kapo trueto.

UNU, DU, TRI !
Jen TRI ŝlosiletoj !

k vare

PAPER FOLI-FIKSILOJ
kun treege longa, maldika, kurbiĝanta korpo tute glata,
kiu regule, precize volviĝas
kvazaŭ serpenteto.
-- Nu, vidu,
el ili tri estas kun nazo triangula,
nur unu estas ark-naza!

ENTUTE tio faras:
TRI kaj UNU
KVAR pinĉaj fiksiletoj !

RESUME

2 kaj 3 faras 5
5 kaj 4 faras 9 !
Jen 9 objektoj el metalo
el kiuj 6 fiksiletoj
kaj tri ŝlosiletoj !

KONKLUDE

NAŬ METALAĴOJ
por mia kesteto.

o.B.



INFANOJ kaj Gvidantinoj en la Esperanto InfanKongreseto dum la SAT Kongreso en Lekturo, Francio la 15an ĝis la 22a de Julio, 1978.

Ĉu vi ŝatus scii kion ili faris tie ?

Ili havis propran ĉambron, kie ili povis kune ludi, desegni, legi, kanti, pentri. Kune ili preparis specialajn trinkaĵojn kaj dolĉaĵojn ! Ili naĝis, ekskursis en Lekturo (eĉ grimpis ĝis la pinto de la preĝeja turo), estis akceptataj de la urbestro kaj partoprenis la tuttagan aŭtobusan ekskurson. Kaj je la fino ili montris la gazeteton, kiun ili preparis.

## SOLVOJ

de paĝo 4 :

I
L I
I L O
L I P O
S L I P O
S P L I T O
P O S T U L I

de paĝo 8:

ĝirafo
ĝibo
ĝemeloj

de paĝo 9:

hakilo

heliko

hirundo

hufoj -- de rinocero, zebro, bisono.

hundo

de paĝo 12:

malsupren 1.

en la sakon 5

sur la tablon 2

supren 3

en la akvon 4

sub la seĝon 6.

---

RAKONTO El Norvega Esperantisto 1977 /5.

Sian neston la motacilo havas en plej nekredeblaj lokoj. Kutima kovejo estas sub tegoloj, en ŝtonaroj, murkrevoj aŭ lignostakoj. Sed ofte oni aŭdas pri nestoj en aŭtomobiloj:motoroj kaj subkaroserioj.Sur la marbordo de Sud-Møre motacila paro konstruis foje neston en la detruita kompaso de malgranda motorboato, kaj ĉiufoje kiam la boatposedanto estis fiŝanta, la motaciloj sidis ĉe la boatejo atendante ĝis lia reveno. Dum envenis la boato,unu el la birdoj tuj flugis al la nesto por plue kovi la ovojn.

MUSOJ: Aŭdu, aŭdu, aŭdu! Ni volas aŭdi la plej maljunan muson!

Maljuna muso: Vi scias, karuloj, kiom ni suferas pro tiuj malbelaj katoj jam de centjaroj. Vere multaj homoj amas la katon, kaj precipe la infanoj ŝatas ludi kun la katoj. Sed facile al ili, la katoj ja ne manĝas homojn. La tuta mondo transformiĝas -- ĉu nia amara sorto restu senŝanĝa ?

MUSOJ: Prave, prave, prave!

Museto: Sed kion fari? La kato paŝadas tiel silente, kvazaŭ ĝiaj plandoj estus vatitaj.

Maljuna muso: Bonŝance mi legis en la nova aboco-libro la saĝan proponon, ke ni devus kroĉi sonorilon sur la kolon de la kato. Kiam la kato venas, ni aŭdus de malproksime la sonorilon, kaj povus rapide forkuri. -- Kion vi diras al tio Ugri?

UGRI: Do ni akiru sonorilon, kaj ni agu rapide !

Maljuna muso: Jes, jes sed laŭ la aboco-libro ne troviĝas tiel heroa muso, kiu kuraĝas meti la sonorilon sur la kolon de la kato. Nu, ĉu vi povas eltrovi ion, Ugri ?

UGRI: Antaŭ nelonge mi aŭdis, ke homo diris al alia homo: "Pli per saĝo, ol per forto." Tion ĉi sekvu ankaŭ la musoj!

MUSOJ: Vivu,vivu, vivu!

UGRI: Kaj ankaŭ tion ni aŭdis, ke la homoj nepovantaj dormi glutas dormigilojn.


Maljuna muso: Bonege,fileto ! Jen vi trafis la aferon! Ni akiru do dormigilon, metu ĝin en la manĝaĵon de la kato, kaj dum la kato dormas profunde, ni metu la sonorilon sur ĝian kolon.

MUSOJ: Vivu, vivu, vivu !

KATO: Miaŭ, miaŭ, miaŭ. Bone gustas la laktâĵo ! Tuj mi manĝas ĉion.... Aa, kiel mi emas dormegi! Eble tuj mi ekdormos. (Ronkas)

Maljuna muso: Tuj la sonorilon ! Rapide sur ĝian kolon, dum ĝi dormas! Nu, finite! Nun ni kuru !

KATO: Miaŭ, miaŭ, miaŭ. Ho kiel multe mi dormis! Nun mi iru labori! (Sonorilo tintas) Ho ve, kia muziko?! (Sonorilo tintas).



## PIRAMIDO .

Ĉiu vorto enhavas la literojn de la lasta vorto kaj unu novan literon --ne necese en la sama ordo.


Indikoj:

1. Infinitiva finaĵo
2. Pronomo
3. Instrumento
4. Movebla rando de la buŝo
5. Folieto por surhavi noton.
6. Maldika peco de fendita ligno.
7. Forte esprimi deziron.


Colin Quayle

Solvo sur paĝo 15.

==========================================================



Ĝ ĝ





Ĝ ĝ


Morsa kodo:

Ĝ = --..-.

4-jaraj fratoj







TIOM da aĵoj ! Mi bilancu !

Unue PINGLETO kun rekta stangeto
kun pinta ekstremo
kaj globa kapeto;

due Ha ! PINGLO alia
kun stango kurba,
ekstremo pinta,
grandega kapo tute plata
kaj traborita globeto !

(Bilanco)

| |
|---|
| UNU kaj UNU faras DU !<br>ENTUTE<br>DU pingloj,<br>du pikaj fiksiloj ! |


trie ŜLOSILOJ kun plata korpeto,

malsupren;
en la sakon:
sur la tablon:
supren:
en la akvon:
sub la seĝon:

(vidu paĝon 15)

KIEN ?

J.Mikulaš



KIU VENOS al la sekvanta kongreseto dum la SAT Kongreso,kiu okazos en Swanwick, Derbyshire, Britio sekvantan jaron de 13a - 20a de Julio 1979 ?

Ankaŭ tie estos ĉambroj por infanoj kun ludiloj, libroj --kaj helpantinoj. En la tereno de la konferencejo oni povos ludi kaj naĝi en la plenaera naĝejo.

Okazos ekskurso al tram-muzeo en Crich , kaj..kaj... ?

Do, jam nun pripensu ĉu VI povos partopreni.

(Sendube sekvos informoj pri Infankongreseto dum la UEA Kongreso).

---

FABELO pri BONA SUNETO

Jen bela kolore ilustrita rakonteto por infanoj... eldonita de Instituto Kooperativa de Edukado Moderna, Fremeta movado.

"Tiun rakonton imagis GRAŻYNA, 10jaraĝa knabino de elementa lernejo en UMIASTOW apud Varsovio, kun koopera helpo de la gelernantoj de EWA MORUS por la desegnaĵoj kaj de W.E. KLIMEK kiu tradukis el la pola."

ICEM-ESPERANTO Bourgeat J.C. Saint-Puy 32310 Valence-Baise, Francio.

Prezo: 7FF. (ICEM Esperanto Nantes 2224-93Z)

---

"La Juna Penso"

Tiuj el vi, kiuj jam interesiĝas pri politikaj kaj sociaj problemoj aŭ serĉas kontakton kun gejunuloj, kiuj konscias pri la valoro de Esperanto, petu informojn pri la Junulfako de SAT kaj pri ties organo "La Juna Penso". Skribu al: Anne-Sophie Levy, 37 Residence de la Madeleine, 78460 Chevreuse Francio.

ADMINISTRACIO de KALEJDOSKOPO S.A.T. Gazeto por Geknaboj

Redaktorino: Ethel Prent.
29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB, Anglio.
Telefona numero: 01-597 1347(ne uzu 01 se vi estas en Londono)

La jarabono por kvar eldonoj post ricevo de pago........ £o,75

Transpago de mono. Bonvolu pagi per poŝtoficeja ĝiro se tio eblas el via lando al W.E.M. konto 35 411 0004 (sama adreso).

Nepagipovaj landoj. Kelkaj geamikoj donacas abonojn por infanoj kaj geinstruistoj en tiuj landoj. Ni petas la ricevantojn de tiuj donacitaj abonoj, ke ili sendu poŝtkarton iam dum ĉiu jaro.

Por kvantaj mendoj. Por 10 aŭ pli da unu eldono al unu adreso ni ofertas rabaton inter 10% kaj 20%.

Perantoj - En diversaj landoj estas SAT-perantoj kaj tiuj transpagos por vi la abonojn pere de SAT, Parizo. Petu informon pri peranto en via lando de ni aŭ de SAT-Centro, 67 avenue Gambetta, Paris 75020, Francio, kiu volonte transpagos viajn abonojn.
Same U E A, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam NL-3015 BJ, Nederlando transpagos viajn abonojn al ni.

---

LA REDAKCIO
bonvenigas verkojn kaj desegnojn de spertaj esperantistoj --ludojn, poemojn, ŝercojn, rakontojn, kiuj taŭgas por infanoj.

DANKON AL ĈIUJ KIUJ JAM KUNLABORIS.

NI VERKAS -
La REDAKTORO de "Ni Verkas" bonvenigas verkaĵojn de infanoj -- sendu ilin al Andre Gimbert
10 Impasse Ayguepasse,
F-19100, BRIVE
Francio.